

## & La vulpo kaj la kapro:

< Rekante 21 el 37 aŭ 18 el 34 batoj por strofo, entute 272 aŭ 296 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por "Konfeso" kaj simila rekantaĵo. Alternativaj melodio kaj rekantaĵo estas tiuj de Granda bovo.>

### (#Melodioj:

(

(#Konfeso: <:37> a;do /dodo dore doTi LaaSo;So dodo dore mimi miimi;mi mifa soso somi miire;re dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; La3La LaTi LaSo SoSo; SoSo SoSo LaSo do; do mire do dodo Ti La))

?

(# Granda bovo: <1,5:2> ;/LaaTi doTiLaSi /Lado mii;mi /soofa mire /TilTi re;re /doore miiredo /TiiTiSi Mii;Mi /LaaTi doLa /SiilLa La;

(#Rekantaĵe: /LaaSiLa Ti; /dooTido refa /miidoTi La; /Laadore miimimi /soomire mi; /miidoTi La; /Tiidore mi /iSi SilLa /La a;))

)×7 )+

### (&Strofoj:

'1 En /puton falis, en ĝi sidis ; la vulpo, laca jam plu salti, ; subite ĝoje ĝi ekvidis ; ĉe l' supra rando kapron halti.

(×:

(&Konfeso: **Zorgojn ĝi foje forgesas ; Tamen ĝoje ĝi sukcesas ; En la puto sidis ĝi ; Zorgojn ĝi foje forgesas.**)

?

(& Granda bovo: **/Turnas en tord' ; /ŝtrumpoj voleme /kurbas en kord' ; /Faros fripon' kiel /burĝa la ul' ; /mallarĝa pord' ; /rozojn ele-/ektu ru2/ĝajn.**) )

'2 Demandis tiu: "Kio okazis? ; Kial vi sidas en obskuro?" ; "Nenio okazis" — ĝi emfazis — ; "jen, vere, loko de plezuro! .....

'3 Ĉi ombra freŝo estas rara ; ĝuego, kiel balzamŝmiro ; la akvo estas freŝa, klara, ; saniga kiel eliksiro. ....

'4 Kaj dum vi en varmego tia ; suferas de soif' kaj ŝvitas, ; mi ... ej! mi estas senenvia. ; Ensalto, kore mi invitas."

.....

'5 La kapro saltis. Sen prokrasto ; la ruza besto sin eksvingis ; al ĝia dors', kaj per vostkvasto ; velante, saltis plu, atingis .....

'6 la supran randon de la puto, ; elgrimpis — kaj tre bone fartis. ; Malsupre en konsterna muto ; la povra kapro ĝin rigardis. ....

'7 Kaj diris nun kun rid-rikano ; de supre la ruzul' fripona: ; "Nu, do adiaŭ! Sed baptano, ; vi estas barbe pli impona .....

'8 ol cerbe. Uzu jenan sperton: ; Ĉe la enir' al iu loko ; pri la eliro havu certon." ; Kaj li foriris post ĉi moko. ....)